

Katalin Kováts: Metodika staĝo en KVINPETALO (2014)

Inter la 14a kaj 18a de aprilo mi, Katalin Kovats, redaktoro de www.edukado.net gvidis metodikan seminarion en Kvinpetalo, Francio.

En la 90-aj jaroj mi plurfoje kursumis en Bouresse; miaj pli aĝaj gefiloj Bence kaj Petra tie pasigis siajn somerajn feriojn, estis unuafoje en esperantista medio, eksentis kaj ekemis paroli, lerni la internacian lingvon. Poste ankaŭ mi alia filo estis kun mi tie antaŭ 10 jaroj. Do, reiri al Bouresse, estis ankaŭ vojaĝo al la pasinteco.



La mastrumado de la centro estas nun en la manoj de la geedzoj Brian Moon – mia kolego el la akademio, kaj Claude Nourmont (*ne nia Claude L.!*) – eks-estraranino de UEA, kiujn mi nun ekkonis en iliaj aliaj flankoj, nome en tiu de gastigantoj, manĝigantoj, veturigantoj, organizantoj. Estis interesa sperto.



Je granda ĝojo al la intensa semajno aliĝis entute 12 plentempaj, kaj 3 parttempaj kursanoj, ĉefe francoj, sed ankaŭ svisino, kataluno, usonano el Berlino kaj kubano. Ni havis junajn partoprenantojn kaj ankaŭ iom pli aĝajn, sed anime tamen junajn!

Kvinpetalon mi trovis iom pli granda ol kian mi konis el la malnova tempo. Al la malnova kvin-konstruaĵa komplekso aldoniĝis nova domo kun novaj ejoj, kie ni nun ĉefe manĝis, sociumis kaj povis RETUMI(!!!), se iu hazarde ne ĝuste tiam rompis la konekton pro simpla telefonvoko aŭ stumblis en la kablo. Por aliaj celoj ni uzis la malnovajn domojn.



La kursejo bedaŭrinde nek grandiĝis, nek heliĝis en la lastaj dek jaroj, kion akcepti iom malfacilis en la komenco, sed danke al nia entuziasmo kaj aktiveco, daŭra ŝanĝo de planoj, de agadlokoj kaj teknikaĵoj, ni venkis la malfacilaĵojn kaj lernis navigi nin en la plenŝtopita ĉambro. Ni sukcesis ensorĉi eĉ lumon kaj varmon en la ejo.

Kiel sperta kaj duboplana kursgvidanto, mi kunportis preskaŭ ĉiujn necesajn ilojn, projekciilon, printilon, librojn ktp. Do, tiuflanke ni estis bone ekipitaj. Krom la lerto, ke en momentoj, kiam mi ne rimarkis la tempopason, mia komputilo simple malfunkciis, ĉu pro troa ŝarĝo de la elektrosistemo, aŭ sukcesa kaŝa interveno de Chuck. Nu, ĉiuj ĝojis pro eta teknika paŭzeto.



La manko de la reto en la klasĉambro estis problemo, sed ni kelkfoje invadis la manĝejon kaj tie kursumis. En kelkaj postagmezoj ni instalas nin eĉ en la ĝardeno, kaj ŝajne ripozante, ni tamen diligente laboris, allogante ankaŭ nekursanojn kaj la hundon de Pierre.

La tagoj estis plenplenaj. Seminario inter la 9a kaj 12.30 (oficiale, sed pli longa reale) kaj post longa franca manĝado kaj purigado, fakte senriproze ni denove plonĝis en la laboron je la 15a horo ĝis la 19a. Postvespermanĝe ni ĉiam havis iun programon, ekz. prelegon pri Kubo, prezenton de retaj ludoj de Chuck Smith, ktp.

En la naskiĝdatreveno de RISKO ni okazigis vivan, ĉeestan ludon, en kiu venkis Sylvie.

En la programo **ni traktis la sekvajn temojn** (la listigo suba estas sen vera kronologia vicordo aŭ graveco)

- **Historio kaj metodoj de lingvoinstruado**, kun aparta atento pri la nuntempe efike uzeblaj elementoj. La aplikata hungara kiel ŝoklingvo vere efikis. Ni spektis, analizis ankaŭ kelkajn filmojn, fragmentojn el lecionoj, ekz. de Stano Marček.
- **Varbado, informado**. Kiel kompili informprelegon kaj mallongan publikan prezenton de Esperanto (tekniko, enhavo, prezentmaniero). Ni spektis filmitajn erojn de mia kurso, gvidita en Vieno, dum la muzeaj noktoj. <http://www.ipernity.com/blog/edukado.net/98314>. Ankaŭ la kursanoj montris al ni siajn ideojn. Dankon al Sylvie, Jean-Francois kaj Claude, plie al Chuck kaj Mélanie pro iliaj kontribuajtoj.
- **Uzo de modernaj teknikiloj kaj de la reto** por instruado de Esperanto (Kompreneble prezento de www.edukado.net)
- **Modernaj kaj efikaj lernolibroj, instrumaterialoj** (vivproksime kun multaj libroj, materialoj, ekzercoj... en kvanto de la kofrujo de mia aŭto.)
- **Planado de semajnfinaĵoj kaj longperiodaj kursoj** (teorio, konsiloj, ekzemploj, praktiko. Ni ofte menciis la laboron de Beatrice Allée, Anna Löwenstein kaj Arlette Plutniak valorigante iliajn materialojn kaj seriojn ĉe edukado.net. Dankon al ili.)
- **Evoluigo de lingvaj kapabloj** kun taŭgaj ekzercoj kaj materialoj (ni havis eĉ tempon elprovi kelkajn ekzercojn, inter ili rekonon kaj 'vendadon' de la strangaj objektoj de Sylvain aŭ rolludon pri la hotelo. La iom 'palan' prezenton de la ĉeesta teatrotrupo vigligis la posta spektado de la samtema prezento de la seminarianoj en Ĉinio, en la Hotelo de Esperanto-Insulo. <https://www.youtube.com/watch?v=ahRfr4pgHJo>. Konkludo: por efike bone ludi, oni devas havi fortajn impulsojn.... Por ludo pri plendado, Hajnano venkis Kvinpetalon. ☺
- **Mi mem prezentis kelkajn trukojn kaj teknikojn** por instruado de tiklaj temoj, gramatikaĵoj, kiel ekz. akuzativo, akuzativo de direkto, refleksivo, korelativa danco... Danke al tiuj prezentoj la kursanoj fariĝis ne nur pli spertaj, sed kelkaj ankaŭ pli belaj.
- **Tipaj lingvaj eraroj de francoj** kaj alinaciuloj kun diskutoj pri gramatikaĵoj kaj leksiko (ekzemple: kvinoo ☺). Mi ekaplikis tuj la **akuzativan dancon** (fortan piedbatadon de la planko ĉe manko de akuzativo)... kaj la teknikon ni daŭre aplikis por turmenti unu la aliajn. Ni profitis dum la manĝoj la ĉeeston de Brian Moon, vicprezidanto de la Akademio, kiun ni ofte konfrontigis kun gramatikaj problemoj. (Tial daŭris la manĝoj du horojn). Estis bone, ke preskaŭ ĉiam li kaj mi mem, la du akademianoj, havis la saman opinion (mi celas gramatikon), kio tamen ne estas tipa situacio ene de la Akademio. ☺




- **Psikologiaj faktoroj de lernado, efika prezento** (Atento, memoro, forgeso, ripeto, ktp).
- **Prezento de propraj instruhelpiloj.** Mian kolekton eble eĉ superis tiu de Pierre, la Unua (ni havis du), kiu venis per plena aŭto de tre interesaj propraj materialoj. Ni estis ĉiuj ravitaj. (Vidu ekz. la foton pri la littukoj).
- **Prezento de konkreta instrusituacio,** baze de la materialo *Pasporto al la tuta mondo* (instruis nin Chuck kaj Mélanie, dankon.)
- **Okazis ankaŭ spertinterŝanĝoj:**
 - a. Viktoro instruis al ni kiel uzi muzikajn gestojn por konsciigi pri gramatiko.
 - b. Sylvie montris komputilprogramon *NoteWorthy Composer* por komponi muzikon aŭ reskribi muziknotojn kaj aldoni tekstojn.
 - c. Chuck ravis nin per komputilaj kaj saĝtelefonaj ludiloj, inter ili per sia ĵus oficiale akceptita ludilo. Oni festis tion. ☺
 - d. Claude L. prezentis sian laboron en kadro de eksterlernaj programoj, kie li instruas Esperanton.
 - e. Pierre L. Informis pri sia laboro por *Esperanto etape* <http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=232>



London, la unuan tagon de la seminario, ni havis du plentagajn gastojn, Pjeron kaj Christian el Limoĝo, kiuj kunportis bongustajn manĝaĵojn, kaj espereble kunportis hejmen utilajn spertojn.

- Ni havis ankaŭ **libroservan vesperon**, kaj kelkaj libroj de tie kaj el mia kofro trovis novajn posedantojn.
- Edukado.net krome sukcesis akiri malnovan, ekstere iom damagitan ekzempleron de PIV (2005) por aldoni ĝin al la premioj de RISKO. Estis donaco de Kvinpetalo. Dankon.
- Por zorgi pri la **envilaĝa informado**, lasttage ni manĝis en la loka restoracio kaj vizitis la bibliotekon, kie ni trovis librobreton kun kelkaj Esperanto-libroj. Claude (L) havis bonan ideon: lokis plurajn bombonojn sur tiun breton, por vekti la apetiton... (ĉu vere pri Esperanto?)
- Krom la vizito de la limoĝanoj **vizitis nin ankaŭ ĵurnalisto...** kaj ni atendas ankoraŭ la aperigon de raporto pri nia kurso en la loka ĵurnalo.
- Katalin (estas mi) lasttage vizitis ankaŭ **Suzanne Bourot**, kiu loĝas samterene, kaj en 1985 fondis, kaj poste gvidis kun George Lagrange la kulturcentron dum 20 jaroj. Dum la interparolo kun ŝi kaj rigardado de la malnovaj albumoj de la centro levigis belaj memoraĵoj kaj retrovigis malnova letero de mia filino **Petra pri la naskiĝo de la DOMIDO**, ankoraŭ videbla, sed en malbona stato, en la ĝardeno.



- Ni volis ankoraŭ kanti, muziki, sed la gitaro - kiun Sylvie el Liono trotis kun si - estis la sola kiu feris, pro tempomankego. Ni simple ne havis pli da momentoj enŝovi ion ajn en la 5-tagan kursprogramon.

Mi mem jes tamen, sukcesis plilongigi la labortempon, kaj kiel kutime, uzis plurajn horojn de la noktoj por mastrumi la retejon kaj okupiĝi pri la organizado de la 3a Tutmonda Ekzameno. Eble estis eraro, ke mi petis kaj eĉ ricevis dormoĉambron, situantan en la domo, kiu havis reton. ☺



Jes, 5 tagoj sufiĉis. La cerboj ne plu kapablis ensorbi pli da informoj kaj akuzativoj. La kursanoj – espereble kontentaj kaj multe pli spertaj – post purigado de siaj ĉambroj, reiris hejmen en la 6a tago. Mi mem faris same.... Sed pro laceco kaj konstrulaboroj iom perdiĝis ĉirkaŭ Tours. Cetere mi devis halti dormi 4-fojojn dumvoje de 860 kilometroj. Preskaŭ rompiĝis mia negativa rekordo.



La hejma tasko estas ankoraŭ dokumenti la kurson, raporti, kolekti fotojn, preni kontakton kun ĉiuj kaj krei por ili surfacon en la KLERIGEJO, kien mi alŝutos materialojn, ligojn por ke la partoprenintoj retrovu ĉion, pri kio ni parolis, okupiĝis.



Fotoj: Brian, Katalin, Nicole, Miguel kaj Viktoro. Pliajn fotojn kaj tiujn ĉi en granda formato vidu ĉe <http://www.edukado.net/biblioteko/fotoj?al=53> Komparu ilin kun mia fotoraporto el la jaro 2002.

Nu, pli-malpli tia estas labori por mi kaj kun mi dum kvin tagoj... en 2014.
Katalin Kovats - www.edukado.net - redaktanto@edukado.net



Bonvenigo



Claude Nourmont kun la hundo de Pierre L.



Pierre L. prelegas pri sia laboro por Esperanto etape



Demontrado de lernilo



Strangaj objektoj de Sylvain



Strangaj objektoj de Sylvain



Miguel prelegas pri Kubo



Katalin gajnis kaj provas cigaron